

ZPRÁVY

ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU INFORMOJ DE ĈEHOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO

Číslo 10
N-ro

Osvětový ústav v Praze

Květen 1962
Majo

ČESKOSLOVENSKÝ ROZHLAS ZAHÁJIL PRAVIDELNÉ VYSÍLÁNÍ V ESPERANTU

Počátkem února letošního roku rozeslal Československý rozhlas ve spolupráci s ČSEV do zahraničí dopis, jehož plné znění otiskujeme:

Praha, 5. února 1962.

Vážení přátelé,

přijměte laskavě dobrou zprávu, že se po dlouholetém úsilí ze strany československých esperantistů zahájila pravidelná spolupráce mezi Československým rozhlasem a Československým esperantským výborem.

Cizojazyčné vysílání Československého rozhlasu (rakouská sekce) začíná od února 1962 pravidelně v mezinárodním jazyce. Jde přibližně o 6minutový program v rámci obvyklého „Hobby Sendung“ (zájmové vysílání), které je součástí vysílání v německém jazyce.

Vysílání v esperantu se budou konat každý poslední čtvrtek v měsíci, mezi 18.45 a 19.00 hod. SEČ na střední vlně 233,3 m 1286 KHz (Československo).

V programech uslyšíte představitele esperantského hnutí v Československu, kteří budou vyprávět o životě různých esperantských kroužků, o literatuře, umění atd.

Program až do června 1962:

22. 3. — Z esperantské knihovny v Praze

29. 3. — Světové esperantské mírové hnutí v ČSSR a jeho práce

26. 4. — Život esperantistů v Olomouci

31. 5. — O esperantské literatuře

28. 6. — Esperantisté v Plzni.

Věříme, že i Vy naleznete ve vysíláních něco zvláště pro sebe zajímavého a prosíme Vás, napište svoje připomínky nebo alespoň potvrzení o poslechu na adresu:

„Československý rozhlas, vysílání pro Rakousko, Praha, ČSSR.“

Došlá pošta závažně ovlivní další užívání mezinárodního jazyka v Československém rozhlasu.

Děkujeme Vám předem za Vaši laskavost a pomoc, kterou nám prokážete

tím, že rozšíříte tuto zprávu mezi svými známými, a jsme s přátelským

„Na slyšenou!”

ČESKOSLOVENSKÝ ESPERANTSKÝ VÝBOR

red. J. M. HAVLÍK

ĈEĤOSLOVAKA RADIO STARIGIS REGULAN ESPERANTO-DISAŬDIGON

Komence de februaro ĉi-jare Ĉeĥoslovaka Radio en kunlaboro kun Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato dissendis al eksterlando leteron, kies plenan tekston ni represas:

Praha, la 5-an de februaro 1962.

Estimataj gesamideanoj,

bonvolu akcepti bonan sciigon, ke post longjara penado flanke de ĉeĥoslovakaj esperantistoj starigis regula kunlaboro inter Ĉeĥoslovaka Radio kaj Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato.

Fremdlingva disaŭdigo de Ĉeĥoslovaka Radio (fako por Aŭstrio) komencas ekde februaro 1962 regule elsendi en Internacia Lingvo. Temas pri proksimume 6-minuta programo en kadro de kutima „Hobby Sendung”, kiu estas parto de germanlingva disaŭdigo.

La Esperanto-elsendoj okazos ĉi un lastan ĵaŭdon en monato, inter 18,45 kaj 19,00 MET sur meza ondo 233,3 m 1.286 KHz (Ĉeĥoslovakio).

En la programoj vi aŭdos reprezentantojn de la movado en Ĉeĥoslovakio, kiuj rakontos pri la vivo de diversaj E-grupoj, pri literaturo, arto, ktp.

Programo ĝis junio 1962:

22. 2. — El la Esperanto-biblioteko en Praha

29. 3. — Mondpaca Esperanto Movado en ĈSSR kaj ĝia laboro

26. 4. — La vivo de esperantistoj en Olomouc

31. 5. — Pri Esperanto-literaturo

28. 6. — Esperantistoj en Plzeň

Ni kredas, ke ankaŭ vi trovos en la disaŭdigoj ion speciale por vi interesan kaj petas vin skribi viajn sugestojn aŭ almenaŭ ateston pri la aŭskulto al la adreso:

„Ĉeĥoslovaka Radio, Sendung für Österreich, Praha, ĈSSR”.

La alsendotaj poŝtaĵoj grave influos pluan uzadon de Internacia Lingvo en Ĉeĥoslovaka Radio.

Vi antaŭdankas al vi pro via afableco kaj helpo per disvastigo de ĉi tiu sciigo inter viaj konatoj.

Kun amika „ĝis reaŭdo!”

ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO – KOMITATO

red. J. M. Havlík

DEKLARACE Z FROSTAVALEN

ZAKLADNÍ ZÁSADY

informace o mezinárodním jazyku: Základní chyby:

1. Nazývat jazyk umělým, pomocným, zeleným apod.; vždy ho nazývejte mezinárodním jazykem nebo esperantem.
2. Povrchně se zmiňovat o různých projektech dorozumívacího jazyka.

29. 5. 1961 VEČERNÍK, Bratislava - totéž.
30. 6. 1981 SMENA, Bratislava - „Čo preloží Kei Kurisu?" Článek dr. I. Havaše ve formě interviu. Jest připojena fotografie našeho japonského přítele.
19. 8. 1961 GLOS LUDU, Ostrava - noticka o družbě třineckých esperantistů s esperantisty při Čechovově městské knihovně v Jaltě, SSSR. (Časopis vycházející v polské řeči - pozn. red.)
5. 7. 1961 HLAS LUDU, Bratislava - "Pod'ťe sa učít esperanta" článek Ladislava Jambora o připravovaném LKE v Trenčianských Teplicích.
26. 7. 1961 PRÁCE, Brno - Noticka o návštěvě sovětské výpravy z Domu učenců v Rostově, ktedou vedl esperantista doc. inž. V. Gruško.
- 26.7. 1961 PRÁCE, Brno - noticka o SET ve Stříbrné zátoce na Vranovské přehradě, který se konal ve dvou čtrnáctidenních bězích po cca 60 účastnících.
- 27.7. 1961 NOVÁ SVOBODA, Ostrava - „Děti dětem". Sloupek R. Czmera o putovní výstavce kreseb japonských dětí, tč. v Přerově a o iniciativě přerovských esperantistů, kteří shromáždili více než 100 zdařilých dětských kreseb z ČSSR pro Maďarsko a Británii.
8. 8. 1961 AUFBAU UND FRIEDEN, Praha - „Für Esperanto-Freunde" sloupek B. Guttmanna o činnosti teplického kroužku esperantistů při ZK ROH Závodů Boženy Němcové v Teplicích.
2. 9. 1961 KULTÚRNY ŽIVOT, Bratislava - Nakladatelské oznámení SPN, Th. Kilian: Cvičebnice esperanta.
4. 9. 1961 SLOVANSKÝ PŘEHLED, Praha - Noticka: „V Polsku se nyní vyučuje esperantu na 50 středních školách a na čtyřech vysokých školách."
10. 1961 AUFBAU UND FRIEDEN, Praha - kursivka s fotografií, v níž čtenář dr. E. Sahliger z Novák doporučuje listu pravidelné uveřejňování kursů esperanta a angličtiny – týdně.
- 8.10. 1961 LIDOVÁ DEMOKRACIE, venkov -- noticka o zahájení kursů esperanta v Parku kultury a oddechu v Hradci Králové. Poznámka o uplatňování esperanta v mírovém hnutí.
13. 10. 1981 MLADÁ FRONTA, Ostrava - noticka o zahájení kursů esperanta v kroužku esperantistů při ZK VŽKG.
25. 10. 1961 ROVNOST, Brno - noticka o zahájení kursů esperanta v kroužku při ZK Žďas ve Žďáru n. Sáz.
21. 10. 1961 SMENA, Bratislava - „Eště o cudzích rečiach", diskusní rubrika se dvěma obsáhlými články o studiu cizích řeči v závodech (dr. Ed. Sahliger, Nováky) a o problému zdokonalování se v cizích řečech po skončení jejích studia (Aug. Čambál).

KRAJINSKŽ A ZAVODNÍ TISK:

25. 4. 1961 ÚNOROVEC, Závody vítězného února n. p. Hradec Králové
Oznámení o Letním esperantském táboru ve Stříbrné zátoce u Lančova - s podrobnými údaji pro zájemce.
24. 5. 1961 PRŮBOJ, Ústi n- Labem - noticka o krajské schůzce esperantistů v Liberci ve dnech 27. a 28. 5.

- 28.6. 1961 TRENČIANSKE NOVINY, Trenčín - „Pod'te sa učiť esperantu" náborový článok L. Jambora o LKE v Trenč. Teplicích.
- 29.8. 1961 KROMĚŘÍŽSKÁ JISKRA, Kroměříž - noticka o odhalení pamětní desky učiteli Jos. Krumpholcovi, komeniologu a esperantistovi v Bystřici p. H.
- 30.8. 1961 PLETARĚKA, Závody B. Němcové, Teplice - „Úspěch esperantistů" sloupek B. Guttmana o činnosti EK při ZK ROH.
- 31.9. 1961 ZÁŘ VYSOČINY, Žďárské strojírny n. p., Žďár n. S. - oznámení o zahájení kursu esp. pro začátečníky v ZK.
13. 10. 1961 VPŘED, Liberec - „Učíme se esperantu" - sloupek Lad. Špíny, vystižná všeobecná informace o hnutí a o práci libereckého kroužku při PKO.
19. 10. 1961 KROMĚŘÍŽSKÁ JISKRA, Kroměříži - „Učte se esperantu", oznámení o zahájení kursů pro začátečníky a pokročilé v ZK n. p. Pal-Magneton.
19. 10. 1961 GOTTWALDOVSKÝ KOVÁK, Gottwaldov, Závody přes. strojír, n. p. „Učte se esperantu" - sloupek o zahájení kursů při OB.

K SEDEMDESIATINAM J. Valašt'ana-Dolinského

Dnes sa dožíva sedemdesiatin hudobný skladateľ JAN VALAŠŤAN-DOLINSKÝ. Narodil sa v Čabe v Mlad'arsku a po skončení preparandia v Arade prišiel na Myjavu. Od roku 1928 žil dlhšiu dobu v Martine ako riaditeľ školy. Všade, kde pôsobil, usilovne zbieral ľudové piesne, upravoval ich a spieval so svojimi detskými i dospelými spevokolmi. Známe sú jeho viaceré zbierky: Hviezdoslavove Letorosty, Čabianske ľudové piesne, Spevom vpred, Slávme slávne, Detské sbory i dve vydania Môjho spevníka a ďalšie, ktoré sa dlho spievali a ešte sa aj spievajú. Známa je najmä jeho ľudová balada - Keď sa milý na vojnu bral. V Martine redigoval tiež hudobnú prílohu Naše divadlo i časopis Varyto, ktorý vydával Svaz slovenských speváckych súborov. Spolupracoval tiež so Slovenskými pohľadmi, do ktorých pravidelne písal hudobné recenzie, články, poznámky. Uprímné priateľstvo ho pojilo s národným umelcom Martinom Benkom.

Okrem hudby druhou najväčšou láskou majstrovou bol medzinárodný jazyk esperanto. Bol spoluzakladateľom esperantského hnutia na Slovensku. R. 1936 vyšla jeho Gramatika a slovník esperantsko-slovenský, v roku 1947 Okienko do sveta — učebnica medzinárodného jazyka esperanta, v roku 1949 Veľká slovenská učebnica medzinárodného jazyka esperanta. Bol spoluzakladateľom Slovenského esperantského ústavu v Martine a hlavným spolupracovníkom Esperantisto Slovaka, v ktorom publikoval esperantské preklady z Hviezdoslava, Vajanského, Krasku, Krčméryho, Podjavorinskej, Plávku, Jégého, Figuli a ďalšie.

Aj dnes by sme našli Jána Valaštana-Dolinského po prekonaní ťažkej choroby s oslabeným zrakom pri práci, pri klavíri i pri písacom stole. So svojim nevyčerpatelným elánom je a zostáva žiarivým príkladom mladým učiteľom. Dr. I. HAVAŠ

Sepdekjara jubileulo J. Valaŝ'an - Dolinský

Hodiaŭ (15. 2. 1962 - rim. de red.) ĝisvivas la sepdekon komponisto Ján VALAŠTAN- DOLINSKÝ. Li naskiĝis en Čaba, Hungario, kaj de Arad li alvenis al Myjava. Ekde la jaro 1928 li dum iu tempo vivis en Martin kiel lernejdirektoro. Ĉie li fervore kolektadis popolkantojn, adaptadis ilin kaj kantis kun siaj infanaj kaj plenkreskulaj kanthoroj. Konataj estas liaj multaj kolektoj: „Letorosty“ de Hviezdoslav, „Čabianske ľudové piesne“ (popolkantoj el Čaba), „Spevom vpred“ (kantante antaŭen) „Slávme slávne“ (ni festu, festu), „Detské sbory“ (Infanaj kanthoroj) kaj du eldonoj de „Môj spevník“ (Mia kantar) kiel la aliaj, longe kantitaj kaj ankoraŭ kantataj. Konata estas precipe lia popola balado „Keď sa milý na vojnu bral“ (Kiam fraŭlo bataliris). En Martin li redaktis ankaŭ la muzikaldonon de la gazeto „Naše divadlo“ (Nia teatro) kaj la gazeton „Varyto“, eldonitan de Asocio de slovakaj popolkantoj. Ankaŭ li kunlaboris kun „Slovenské pohľady“ por kiu li regule skribadis muzikrecenzojn, artikolojn, rimarkojn. Kora amikeco ligas lin kun nacia artisto, pentristo Martin Benka.

Krom muziko, la dua plej granda amo de la majstro estis internacia lingvo Esperanto. Dolinský estas hodiaŭ nestoro de Esperanto-movado en Slovakio. En la jaro 1936 aperis lia GRAMATIKA kaj VORTARO ESPERANTA-SLOVAKA, en 1947 FENESTRETO EN LA MONDON - lernolibro de Internacia Lingvo Esperanto, en la jaro 1949 "Granda slovak lernolibro de Internacia Lingvo Esperanto". Li estis kunfondinto de Slovaka Esperanto-Instituto en Martin kaj ĉefkunlaboranto de la gazeto „Esperantisto slovak“, kie li publikigis Esperanto-tradukojn el la verkoj de Hviezdoslav, Vajanský, Krasko, Krčméry, Podjavorinská, Plávka, Jégé, Figuli k. a.

Ankaŭ nun, post grava malsano kun malfortigita vidpovo, ni trovas Ján Valaŝtan-Dolinský ĉe lia laboro, ĉe la piano kaj ĉe la skribotablo. Kun sia neelĉerpebla entuziasmo li estas kaj restas brilanta ekzemplo por junaj instruistoj.
(Dr. I. HAVAS — el „PRACA“)

...od prvního učitele komuny „MÁJOVÉ JITRO“

V rozhovoru s Alexejem Danilovičem Borisoglebským, asistentem katedry botaniky ovocnářského ústavu, přišla řeč i na esperanto. Alexej Danilovič se obšírně rozhovořil o své četné korespondenci nejen s esperantisty v SSSR, ale i z Číny, Vietnamu, Bulharska aj. Ve své nadšené řeči vyzdvihoval význam esperanta především při upevňování družby mezi národy.

Když jsem byl již na odchodu, Alexej Danilovič náhle řekl: „Myslím, že by vás zajímalo seznámit se s některými dopisy, které jsem obdržel v poslední době od esperantistů“. Odebrali jsme se tedy ihned na botanickou katedru, kde na jednom stole zavaleném odbornou literaturou o botanice a biologii jsem našel i esperantské časopisy. Alexej Danilovič však rychle vybral ze své korespondence světlemodrou obálku a dvě pohlednice, aby mě seznámil s jejich obsahem. „Toto je dopis od prvního učitele komuny „Májové jitro“, Adriana Mitrofanoviče Toporova a tyto lístky jsou od jeho žáka Štěpána Pavloviče Titova, otce kosmonauta Germana Titova.

Po přečtení dopisů mi prolétly myslí všechny pověsti a články, otištěné v různých časopisech po triumfálním kosmickém letu Germana Titova. Vrátil jsem se zpět do dvacátých let, mezi prosté lidi vzdáleného Altaje, kteří v prvních dnech zřízení Sovětského svazu založili komunu s poetickým jménem „Májové jitro“. Tito energičtí budovatelé nového života byli vlastně „duchovními předchůdci“ Germana Titova. Prvním učitelem této komuny byl Adrian Mitrofanovič Toporov, člověk s mnohostrannými zájmy a hlubokými vědomostmi. On to byl, který vzdor všem těžkostem v zapomenuté sibiřské vesničce založil školu, klub, lidový orchestr, po večerech předčítal a

seznamoval dosud negramotné obyvatele s klasiky ruské literatury. Jejich kritiku klasických děl sepsal v knize „Rolníci o spisovatelích“, která je bibliografickou zvláštností a bude znovu vydána.

Tento všestranný člověk našel čas i pro učení esperanta.

Kde nyní žije a co dělá tento „duchovní předchůdce“ kosmonauta Germana Titova? Na tyto otázky dává odpověď jeho dopis, adresovaný Alexeji Daniloviči Borisoglebskému.

Adrian Mitrofanovič Toporov prošel těžkým životem, avšak ani dnes, v 70 letech svého života, neztratil zájem a chuti do práce. V dopise píše: „... po kosmickém letu svého „duchovního vnuka“ Germana Titova jsem byl já, neznámý selský učitel — pensista, doslova zavalen dopisy a telegramy.“

Před časem vystoupil i v moskevském rozhlasu a v Moskvě přímo, po dlouhých letech se opět setkal se svým bývalým žákem Štěpánem Pavlovičem a jeho synem Germanem Titovem. „Jeho životem, jeho činy jsem vždy měřil svůj vlastní život“, napsal o něm jeho žák Štěpán Titov. „Esperanto jsem měl a dosud mám velice rád,“ píše dále ve svém dopise Adrian Mitrofanovič Toporov. „Chápu jeho veliký význam pro veškeré lidstvo. Napsal jsem sám učebnici esperanta a velice mě zajímá stav esperantského hnutí u nás.“

Věru, takových učitelů by mělo být co nejvíce, aby svůj všestranný zájem a vědomosti předávali další generaci a přispívali tak i ušlechtilým vztahům mezi lidmi.

Výňatek z článku K. Potapova v „Mičurinské pravdě“ ze dne 14.12.1961. Z ruštiny přeložil MŠ.

CELKOVÝ PŘEHLED O VÝSLEDKU SBĚRU STARÉHO PAPIRU V ESPERANTSKÝCH KROUŽCÍCH

ČESKÝ PŘEKLAD VÝZVY POLSKÉHO ROZHLASU

MILÁ POSLUCHAČKO, MILÝ POSLUCHAČI!

Rychlé, přesné a objektivní informování veřejného mínění o událostech na mezinárodním poli, o skutečnostech a zásadách, hraje nyní význačnou roli při zajišťování světového míru. Polský rozhlas se snaží tento úkol plnit. Rádi bychom se od vás dověděli, milí posluchači, jak vy hodnotíte činnost Polského rozhlasu v tomto směru. Proto si dovoluujeme učiniti vám několik dotazů. Byli bychom velmi šťastni, kdybyste se laskavě zúčastnili naší ankety. Zde jsou naše otázky:

1. Vyhovuje rozsah, způsob a doba vysílání o mezinárodních událostech, jak je provádí Polský rozhlas, vašim přáním a zájmům?

2. Osvětlují podle vašeho názoru komentáře, rozhovory před mikrofonem a jiné části našeho programu, dostatečně jasně a správně hlavní problémy naší doby (takové jako např. problém úplného a všeobecného odzbrojení, německý problém a problém Berlína, otázku likvidace kolonialismu, mírového soužití mezi Východem a Západem ...)?

Doufáme, že neodmítnete naši žádost a odpovíte na uvedené otázky. Budeme vám srdečně vděčni za jakékoli návrhy, připomínky a kritické

poznámky. Naše anketa sice není soutěží, avšak rozhodli jsme se přesto slosovat mezi jejími účastníky mnoho cenných výher.

Očekávající vaši brzkou odpověď zůstáváme s hlubokou úctou: ředitel E. Uzdaňski. Adresa: Polské Rádio, Esperanto, VARŠAVA, POLSKO.

**CELKOVÝ PŘEHLED O VÝSLEDKU
SBĚRU STARÉHO PAPÍRU
V ESPERANTSKÝCH KROUŽCÍCH**

Hradec Králové	591,50 kg
Třinec	567,— kg
Žilina	527,— kg
Havířov	340,— kg
Kolín	284,— kg
Poděbrady	266,— kg
Místek	89,— kg
Lanškroun	79,— kg
Nová Paka	48,— kg
Libice n. Cidl.	40,— kg
Starý Bohumín	24,— kg

**SUPER LA LERNOLIBRO DE ESPERANTO DE
THEODOR KILIAN**

La longe atendita kaj sopirita ĉeĥlingva lernolibro de Esperanto kompilita de prof. Theodor Kilian en tria aŭgusta semajno aperis en la vendejoj. Sed ĝi ekfulmis nur kiel aerolito sur la ĉielo de nia movado, ĉar ankoraŭ samtage ĝi estis en la librovendejoj elvendita.

Post tralego de la lernolibro mi konstatas, ke ĝi estas bone kaj faksperte verkita kaj mi konsideras ĝin plej bona lernolibro el la ĝis nun en ĉeĥa lingvo aperintaj. La lecionoj (20) estas tre ampleksaj, kun abunda tradukmaterialo, kun kontroltekstoj, konversacio, klare eksplikita gramatiko, lecionvortaretoj. La lecionoj havas aktualajn temojn, korespondhelpajn letermodelojn, kaj tio kune kun ampleksa legolibra parto kaj relative sufiĉe riĉa Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaro povas la lernantojn provizi per sufiĉa kvanto da bezonaj esprimoj. Laŭdinda estas ankaŭ la konciza klarigo de fonetikaj reguloj, precipe koncerne la longecon de akcentitaj vokaloj, kion ĝis nun bedaŭrinde la aŭtoroj neglektadis. Tial ĉi tiu lernolibro taŭgas ankaŭ tre bone por aŭtodidaktoj. Ankaŭ grafike ĝi estas tre bone aranĝita kaj kelkaj celtaŭgaj ilustraĵoj helpas la klarigon. En la 273-paĝa duontole bindita libro mi trovis sole du preserarojn (p. 188 Lud. Poděšt, p. 227 mini dolovati).

Eĉ tre severa recenzanto ne povas en la unua eldono trovi multon plibonigindan, kompletigindan. Sed ĉar tiu ĉi bonega lernilo certe baldaŭ

havos pluajn eldonojn, mi volas ĉi tie iom detale atentigi pri kelkaj plibonigindaj punktoj.

En la naŭa leciono inter la riĉa parenkaro de la familio Ĉech estus por kompleteco bofilo aŭ bofilino enplektebla. Sur p. 55. devus, por ĝuste komenti la bildon, teksti: tuj poste li saltas trans la barelon. Ĉar ja io diferenca estas „infanoj saltas trans la barilo" kaj „infanoj saltas trans la barilon". Kvankam la plena Vortaro citas ankaŭ inter kunakuzativaj Zamenhofaj kaj aliaŭtoraj frazoj unu lokŝanĝan sen akuzativo, tamen kaj la Plena Gramatiko kaj la nuna ĝenerala uzo postulas ĉe lokŝanĝa movo akuzativon. Sur p. 61 ĉe prepozicio „da" mi rekomendus aldoni simplan klarigan frazon „Per „da" oni mezuras nur el nedifinita materialo. Se ĝi estas difinita per la artikolo aŭ alia montra pronomo, oni uzas „de". Ekz. Iom da bona kafo. Sed: Iom de la bona kafo, iom de tiu bona kafo. P. 79, por „honesta" mi tamen lasus la ĉefan signifon „počestný, poctivý", kiel estas en la vortareto sur p. 220, „slušný" mi aldonus dualoke. Same s. p. 84 „tefinika" mi unue tradukus „technická" — zde průmyslová. S. p. 90, 88 mi „servouniformo" preferus anstataŭi per „deĵoruniformo". P. 90 kaj ĉie en la leteroj, ankaŭ en la legolibra parto, mi rekomendus forlasi la ĝentilecan majuskligadon de la pronomo Vi, Via. ĝi estis uzata, kaj eĉ ne tre konsekvence, en komenca periodo de Esperanto, sed estis ĉiam pli forlasata. Hodiaŭ ĝin uzas nur tre malmultaj kaj ankaŭ la Plena Gramatiko malrekomendas ĝin, same kiel majusklon ĉe la nomoj de nacio: ĉeĥoj, rusoj ktp. Cetere ankaŭ en la naciaj lingvoj la kutimo estas diversa: ekz. angloj majuskligas en leteroj pronomon de la unua persono. P. 90 balailo — koště, aldoni smeták. P. 91, 128 ĉe sufikso -isto aldoni: též stoupenec hnutí, učení nebo sportu: komunisto, anarhisto, fotbalisto, hokeisto, ŝakisto. P. 96 En frazo „De Třebíč tra Praha kaj Plzeň ĉi tien ĝi estas proksimume 400 km" estas preferinde forlasi „ĝi". P. 111 „Joĉjo inde ignoras la mokan rimarkon" tekstu „Joĉjo digne . . ." P. 118 en frazo „Mi venis, por redoni al vi libron" forfalu la komo. P. 162 kaj aliaj artikoloj pri nia ĉefurbo evitas sisteme la Esperantan formon Prago, kiu estas paralele uzebla apud la nacia formo, kaj havas krome avantaĝojn de oportuna almeteblo de sufiksoj. Ia malŝateto al la radiko Prag' estas neniel pravigebla, ĝi estas praslava vorto kaj ni trovas Praga en rusa, pola, serbokroata lingvoj, ĝi estas en la latina kaj en ĉiuj mondlingvoj. Sekve ĝi estas plej internacia. En ampleksaj Esperantaj tekstoj ni do preferu la Esperantajn loknomojn, kie ili ekzistas, ekz. Parizo. Vieno, Varsovio, Vistulo, Moskvo, Prago, kaj la naciajn formojn oni rezervu por adresaj notoj, k. s. P. 167 „situata" oni anstataŭigu per „situanta", ĉar situi estas netransitiva verbo kaj ne estas motivo uzi ĉi tie licencon rezervendan prefere por poezia neceskazo, nome laŭ regulo pri sufiĉo kaj neceso ellasi el la vorto sufikson —ig— ĉe pasiva participo. P. 173 apud la formo gobeleno jam Wüster, kaj nove Waringhien (ankaŭ Filip) preferas la formon gobelino. P. 211, aĉa estas unuavice aspekta redukto, do prefere tradukenda per šeredný, ohavný. P. 212 anso — aldonu „klicka u dveří". Arbitra — „svévolný", blasfemi — aldonu „klíti", bleki — aldonu „vydávati zvířecí zvuky" (meĉeti — meki, kaproleki). P. 214 brui — unue „hluĉeti", p. 217, farmi — kompletigi: najmouti půdu, hospodářství, p. 232, rampi — aldonu „lézti" (ne však šplhati), rezisti — aldonu „odolávati", p. 234 specimeno — aldonu „vzorek", p. 249 ĉe „koule" — globo, kuglo; „kraj" — rando, regiono, kaj en aliaj similaj kazoj, kie pli-malpli diferencaj signifoj viciĝas apude eĉ ne per punkt-komo dividitaj, estus konsilinde eĉ en tia

malgranda helpa vortareto per koncizigo klarige helpi la komencantojn ĉe vortelektio, ekz. koule — globo, (střela) kuglo. P. 258 razítko — aldonu unue stampo, (nástr. stampilo), rmoutiti — aldonu aflikti, p. 259 salám — aldonu „salamo" (PV. - suplemento), skutečný — aldonu „reala", p. 260 služba — aldonu „deĵoro", směti — rajti, darfi („povi" forlasi), stonek — aldonu tigo, p. 261 šaty — aldonu: ženské „robo", p. 265 vkus — aldonu belgusto, p. 265 vlhký — aldonu humida, p. 266 vzdorný — aldonu „spita" (obstina — tvrdošijný), p. 268 enmetu: zkusiti — provi, p. 269 žalář — aldonu „karcero", žebřík — eskalo (PV - suplemento).

Estas dezirinde, ke la nova modela kaj moderna lernolibro baldaŭ aperu en pluaj kaj pli grandaj eldonoj, kiel respondus al la granda intereso de la publiko kaj la bezonoj de niaj kluboj kaj rondetoj. JIRÍ KORÍNEK

LERNOLIBRO DE ESPERANTO. Verkis Theodor Kilian. Eldonis Ŝtata Pedagogia Eldonejo, Praha 1961. Paĝoj 273, 145x205 mm, bindita. Eldonkvanto 3000 ekz. Prezo de bindita volumo Kčs 12,10.

ESPERANTA—ĈEĤA KAJ ĈEĤA—ESPERANTA POŝVORTARO.

Verkis Rudolf Hromada. Eldonis Ŝtata Pedagogia Eldonejo Praha 1961. Paĝoj 392, 12x8 cm. Eldonkvanto 3000. Prezo de bindita volumo 8,50 Kčs.

Jam kelkajn jarojn sentis ĉeĥoslovakaj esperantistoj mankon de Esperantaj vortaroj. Vortara komisiono de lingva sekcio ĉe ĈSEK pritraktis tiun ĉi demandon dum sia kunveno en Brno en marto 1960. Kaj la unua rezulto de ĝia laboro estas tiu ĉi poŝvortaro de R. Hromada.

La aŭtoro en sia antaŭparolo diras, ke la vortaro enhavas pli ol 5000 radikojn, ne kalkulante derivaĵojn. Sed per rapida kalkulo oni vidas, ke la parto Esperanta-ĉeĥa havas 5800 radikojn kaj parto ĉeĥa-Esperanta 8700 radikojn. La bazo de la vortaro estas internacie rekonita Esperanto-vortara normo „Plena Vortaro" (1933) kun kritike elektitaj radikoj el ĝia „Suplemento" (1954) rilate al moderna „Grand Dictionarie Esperanto — Français" de prof. G. Waringhien, direktoro de Vortara sekcio ĉe Esperanta Akademio. La vortaro enhavas eĉ multajn esprimojn de „lastaj tagoj", ekz. sputniko (artefarita satelito), cibernetiko, memservado, surluniĝi.

La aŭtoran senton de respondeco pri la lingva evoluo de Esperanto atestas la fakto, ke en la parto ĉeĥa— Esperanta li eliminis superflujajn neologismojn, dum en parto Esperanta— ĉeĥa per envicigo de plej novaj internacie jam uzataj neologismoj li ebligas al konsultantoj de la vortaro plene kompreni eĉ la tekstojn de la plej modernaj aŭtoroj. Por lingve edukadi, la aŭtoro atentigas uzanton de la vortaro pri ĝenerale valida (oficiala) esperanta esprimo, kiun oni preferu antaŭ neologismo. En granda amplekso estas prilaboritaj ĉeĥaj prepozicioj kaj prefiksoj havantaj vortokrean signifon.

La nomo de Rudolf Hromada, kiu estas konata kiel elstara, sperta Esperanta vortaristo, garantias perfektecon de lia laboro. La manuskripton kontrolis s-anoj J. Mařík kaj dr. T. Pumpr, la lasta estas aŭtoro de alligita resumo de Esperanta gramatiko. Per valoraj rimarkigoj kaj teknika helpo atribuis al la verko Jiří Hromada.

Preseraroj en la vortaro preskaŭ ne estas, krom kvin kaj tiuj estas

korektitaj en la fino de la verko. Nerimarkitaj estas nur bagatelaĵoj: dŭverovat paĝo 42, korespondajo p. 190, kulturni p. 194. La vorton luno (mĕsíc) en frazo — přistát na mĕsíci — mi rekomendus skribi kun majusklo.

La libro estas bindita en praktika kovrilo el artmaterialo (PVC). Esperantistoj kritikis malĝustajn kolorojn de E-emblemo sur kovrilo: verda fono, blanka stelo kun verda E. sed tio estas kulpo de grafikisto.

Nova Esperanta—ĉeĥa kaj ĉeĥa—Esperanta vortaro estas valora helpilo por ĉeĥoslovakaj esperantistoj kaj ĝi estas fundamenta ŝtono por ellaboro de „granda" vortaro.

La eldonkvanto estis forvendita dum kelkaj tagoj kaj pli ol 2000 mendintoj atendas ĝian novan eldonon aŭ almenaŭ aldonpreson. A. S.

• • •

KOLÍN. Esperanto-rondeto ĉe Uzina klubo ROH (Revolucia Sindikata Movado) de maŝinfabrika TATRA en Kolín kunlabore kun Uzina komitato ROH, aranĝos la 1-an ĝis 11-an de junio 1962 ekspozicion de infanaj manlaboraĵoj el landoj de la paca tendaro sub devizo: „Por tutmonda paco, ĝojplena vivo kaj feliĉego de ĉiuj infanoj de la tuta mondo".

ESPERANTA-RUSA LETERO DE S-ANO S. P. TITOV, PATRO DE LA KOSMONAŬTO G. S. TITOV, AL S-ANO THEODOR KILIAN, ESPERANTO-RONDO ĈE KLERIGA DOMO, EN TŘEBIČ, ĈSSR.

(La rusa parto de la letero estas flanke signita per streko.)

Kara kaj estimata Fjodor Ivanoviĉ !¹⁾

Permesu al mi esprimi mian sinceran dankon por Via letero, por Viaj bonaj sentoj kaj la sendaĵo — la lernolibro. Dum 25 jaroj mi ne uzis la lingvon kaj por mi estas tre malfacile esprimi miajn pensojn per Esperanto. Permesu al mi skribi ruse, krom tio Vi iam loĝis en Siberio kaj devas kompreni la rusan lingvon. Ĉi tio estas por Vi necesa, por ke Vi ne forgesu la potencan lingvon!

Ĉiuj lokoj, kiujn Vi menciis en Via letero kaj kie Vi vivis dum la milito²⁾, estas al mi konataj. Via supozo pri tio, kie mi povis konatiĝi kun Esperanto, estas ĝusta. A. M. Toporov³⁾ donacis al mi en la jaroj de mia juneco malgrandan vortareton de la lingvo Esperanto kaj tiam komenciĝis mia konateco kun la lingvo. Pri Inocento Seriŝev rakontis al mi ankaŭ li kaj ĉe li (ĉe Seriŝev) Toporov konatiĝis kun tiu lingvo. Seriŝev ankoraŭ vivas, li loĝas en Aŭstralio, pri tio mi sciiĝis de lia fratino, kiu vivas en la ĉirkaŭaĵo de Moskvo.

Nun mi ricevadas multe da leteroj. Skribas esperantistoj el ĉiuj kontinentoj, por diri la veron, el Antarktido mi ricevis ankoraŭ nenion. La poŝtaĵo estas tiel abunda, ke ne eblas respondi al ĉiuj. La esperantistoj provizas min per perioda literaturo kaj lernolibroj. Iom post iom mi denove proprigos al mi la lingvon, kvankam mi nun havas por tio malmulte da tempo: necesas iri renkonte al la homoj, ĉar la intereso kiel pri mia filo tiel pri mi mem ankoraŭ ne malvarmiĝis.

Mi dankas al Vi por la foto, nun mi pli bone prezentas Vin al mi kaj konatiĝis kun Via edzino. Transdonu al ŝi saluton de mia edzino.

Estu, kara samideano, sana, feliĉa kaj laborkapabla!

Sincere Via

S. TITOV

24/1-62

P. S. Mi tre bone komprenis Vian leteron, sed kiel Vi komprenos mian skribaĵon?

1) ĝentila alparolo laŭ la rusa kutimo, ĝi signifas „Teodoro filo de Johano” (Johano - ruse Ivan).

2) Rilatas al la unua mondmilito.

3) S-ano M. A. Toporov estas nomata en la Soveta Unio „Spirita avo de la kosmonaŭto 2”, ĉar li estis instruisto de lia patro. S-ano Toporov verkis Esperantan lernolibron por rusoj kaj estas aŭtoro de la rimarkinda verko „Vilaĝanoj pri verkistoj”. En sia lasta letero li skribis al mi: „Mi havas nekredeble multe da laboro”. Rim. Th. K.

Rimarkigo: S-ano S. Titov sendis al mi foton, sur kiu oni vidas lin kaj lian edzinon. Sur la dorsflanko oni legas jenan Esperantan dediĉon: „Je memoro al niaj ĉeĥoslovakaj amikoj-geedzoj Kilian de la gepatroj de kosmonaŭto II.”

S. TITOV 24/1-62

Recenzo:

PLUK

miniaturaj de Poul Thorsen

Kiu konas la simpatiajn trajtojn de Poul Thorsen — ĉu (kio estas pli agrabla) laŭ la originalo — aŭ kiu legis iun el liaj antaŭaj libroj, etendos kun avido la manon al lia plej freŝa poemaro, kiun li nomis kurioze „Pluk”. Kial Pluk? Nu, ĝi rememorigas fonetike al liaj tradukoj de spritaj miniaturaj versaĵoj de la dana satiristo Kumbel, kiuj en la jaro 1956 aperis en Esperanto sub la titolo Gruk. Sed ĉi-foje temas pri poemetoj originalaj, ĉiuj de tiu ĝenro, kiun ni konas en la ĉeĥa literatura tradicio sub la nomo epigramoj. La senindulga mano de la satiristo plukas kaj elŝiradas plumornamojn el la vostoj de trofieraj kokoj, ĝis ilia falsa parado flugas ĉiudirekten. Entute 93 epigramoj enestas en la kolekto, kaj ili estas tre diversspecaj. Kelkajn, ne multajn, mi nomus „versoj sendentaj”, ĉar ili mordas kvazaŭ en la aeron, trafante nur tre ĝeneralajn malvirtojn kaj malvirtetojn; tamen la aliaj posedas dentojn akrajn, kies enmordo en la tibikarnon de trafita objekto aŭ subjekto estas tre sentebla, kaj samtempe kaŭzas amuzon kaj plezuron al la subjektoj netrafitaj. Kaj simpatie estas, ke la epigramoj de Thorsen partias al la idealoj de la homara progreso.

La aŭtoro ja avertas ankaŭ la „sekajn geonklojn”, ke ili ne legu la parajn foliojn, ĉar tie troviĝas versaĵoj, kiuj povus ŝoki ilian prudecon. Nu, la afero ne estas tiel katastrofa; ankaŭ tiuj moviĝas en la limoj de tolerebleco.

Kiu ŝatas la ĵongladon per la lingvo, tiu amuziĝos ankaŭ per travidebla ŝerca deformado de vortoj, kiu tamen ne estas memcela, sed tendenca (ekz. statistifiko anstataŭ statistik-mistifiko).

Por doni specimenon de tiuj spritaj versaĵoj, ni represas du „plukojn”:

unu iom ĝeneral-teman, la alian kun tendenco plej aktuala.

UTILA ĈIRKAŬVOJO

Parolo senpera el koro sincera
devigas min levi la ĉapon,
Sed pli mi admiras,
se l'vortoj trairas
survoje al buŝo la kapon.

DU SLOGANOJ

L'atoma bombo:
la homa tombo.
L'alternativo:
paca kunvivo.

Postnoto:

Pluk — miniaturoj de Poul Thorsen.

Eldonis 1960 Dana Laborista Esperanto-Asocio.

Paĝoj 96, formato 11x15 cm, prezo 4,50 d. kr. aŭ 0,65 .us. dol. Aliaj plej konataj verkoj de la aŭtoro: Tra densa mallumo. Faktoj pri Danlando, Rozoj kaj urtikoj.

Pumpr

LA 97-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
okazos en Kopenhago la 4-an ĝis 11-an de aŭgusto 1962 sub la alta protektado de la Dana ĉefministro s-ro Viggo Kampmann.

ĈINNOST ESPERANTSKÝCH KROUŽKŮ.

AGADO DE ESPERANTO-RONDOJ

BRATISLAVA

Slovenská akademie vied v Bratislavě vydala knihu Pavla Poláka: „Internacionálna pomoc československého proletariátu národom SSSR“; dejiny československého družstva „Interhelpe“ v sovietskej Kirgizii. (Interhelpe — vzájemná pomoc). Obsahuje archívni materiály, články z tisku a vzpomínky žijících členů.

Slovaka Scienca Akademio en Bratislava, eldonis libron de Pavel Polák: „Internacia helpe de ĉeĥoslovaka proletaro al popoloj de USSR“ historion de Ĉs. kooperativo „Interhelpe“ en soveta Kirgizio.“ ĝi enhavas arkivajn materialojn, artikolojn el gazetoj, kaj rememorojn de ankoraŭ vivantaj membroj.

BRNO

Kroužek esperantistů při „Parku kultury a oddechu“ v Brně oslavil 25. — 26. listopadu 1961, šedesátileté jubileum svého založení. Bohatý kulturní

program, který vypinili posluchači brněnské konsarvatoře za uměleckého vedení prof. Vilibalda Scheibera, byl odměnou hostům, kteří přijeli z mnoha míst, aby brněnskému kroužku blahopřáli. Esperantistům v Brně přejeme mnoho zdaru v další práci.

Esperanto-klubo ĉe „Parko de kulturo kaj ripozo” en Brno festis 25. — 26. 11. 1961 sesdekjaran jubileon de sia fondiĝo. Riĉa kultura programo en kiu rolis anoj de konservatorio en Brno sub artista gvidado de prof. Vilibald Scheiber, estis rekompenco al gastoj, kiuj venis el multaj lokoj por gratuli al E-klubo en Brno. Al esperantistoj en Brno ni deziras multajn sukcesojn en ilia laboro.

GOTTWALDOV

V Gottwaldově je asi 200 esperantistů. Z toho je 40 aktivních organizováno v E-kroužku při Městské osvětové besedě. Byl uspořádán kurs pro začátečníky (30 účastníků) a založena knihovna. Na pravidelných schůzkách jsou vždy zajímavé programy: přednášky, hudební přehrávky atd.

En Gottwaldov estas ĉirkaŭ 200 esperantistoj. El ili 40 aktivaj estas organizitaj en E-rondeto ĉe „Urba kultura domo”. La rondeto aranĝis kurson por komencantoj (30 partoprenatoj). Dum la regulaj kunvenoj estas ĉiam kultura programo: prelegoj, muzikreprodukto ktp. Oni fondis bibliotekon.

HAVÍŘOV

Pravidelné schůzky se konají každou druhou a čtvrtou středu v 19 hod. v místnosti nového kulturního domu Petra Bezruče v Havířově II. Každoročně pořádá kroužek kursy pro začátečníky.

Ĉiun duan kaj kvaran merkredon je la 19-a horo okazas kunvenoj en nova kultura domo Petr Bezruč en Havířov II. Ĉiujare oni aranĝas kurson por komencantoj.

HRADEC KRÁLOVÉ

E-kroužek u PKO chce uskutečnit jednodenní autobusový zájezd do Klodzka v Polsku. Tam se setkají s polskými esperantisty. Cestovné přibližně 50 Kčs.

591,50 kg starého papíru dali členové kroužku do sběru v akci za zvýšení nákladu esperantských publikací.

E-rondeto ĉe PKO aranĝos unutagean aŭtobusan ekskurson en la urbon Klodzko en Polujo. Tie ili renkontiĝos kun polaj samideanoj. La vojaĝprezo proksimume 50 Kčs.

591,50 kg da malnova papero kolektis la membroj en kampanjo por plialtigi la eldonkvanton de E-presajoj.

KLADNO

Podle zprávy časopisu „Kladenský kovák”, navštívil švédský esperantista, člen „Společnosti švédsko-československého přátelství” s. J. Trygg, se svým synem Kladno. Hosté si prohlédli město a závody. Prohlédli také byty ve „věžových domech”. Vybavení bytů se jim velmi líbilo.

Laŭ sciigo de la gazeto „Kladenský kovák” sveda samideano J. Trygg, membro

de „Asocio de sveda-ĉeĥoslovaka amikeco" vizitis kun sia filo la urbon Kladno. La gastoj pririgardis la urbon kaj uzinojn. Ili vizitis ankaŭ loĝejojn en modernaj altaj „turdomoj". La ekipo de la loĝejoj tre plaĉis al ili.

K O L Í N

EK pri ZK Tatra schází se pravidelně každou středu od 14.30 do 17.30 hod. Byl promítnut úzký film z E-mládežnického tábora v Lančově. Uspořádána výstava fotografií a dětských kreseb z 12 zemí. Navštívilo ji 680 lidí. K státnímu svátku Maďarska byla uspořádána přednáška o socialistickém Maďarsku. Text poslal E-klub z Budapešti. Členové navštívili 23. X. 1961 Prahu u příležitosti návštěvy esperantistů z Kuby, SSSR, Polska a Maďarská. V říjnu zahájili další kursy esperanta. 10 našich členů se zúčastnilo oslav 60 let založení E-klubu v Brně.

E-rondeto kunvenas regule ĉiumerkrede je la 14.30 ĝis la 17.30. Estis projekciita mallarĝa filmo pri E-junulara tendaro en Lančov. Oni aranĝis ekspozicion de fotografiaĵoj kaj infanaj desegnaĵoj el 12 landoj. Vizitis ĝin 680 personoj. Al ŝtata memortago de Hungarujo oni aranĝis prelegon pri socialisma Hungarujo. La tekston de prelego sendis E-klubo de Budapeŝto. Membroj de la klubo vizitis la 23an de oktobro ĉefurbon Praha ĉe okazo de la vizito de samideanoj el Kubo, SSSR, Pollando kaj Hungarujo. En oktobro estis malfermitaj novaj kursoj. 10 klubanoj partoprenis solenan omaĝon de 60jara jubileo de E-klubo en Brno.

LIBEREC

V Libereckém kulturním kalendáři jsou pravidelně otiskovány programy schůzi esper. kroužku, které se konají pravidelně každý týden. Také krajský časopis „Vpřed" uveřejnil po dlouhém čase příznivý článek o esperantu.

En kultura kalendaro de urbo Liberec estas regule presataj programoj de kunvenoj de E-rondeto, aranĝataj ĉiusemajne. La loka gazeto „Vpřed" denove post longa tempo publikigis favoran artikolon pri Esperanto.

LIBICE NAD CIDLINOU

Členové E-kroužku ZK Mepol, národní podnik, odpracovali 112 hodin na chmelové brigádě. Funkcionář našeho kroužku zúčastnil se politického školení Osvětového ústavu a ČSEV 25. 6. ve Frýdlantě n. O.

Membroj de EK ĉe ZK Mepol laboris 112 horojn en kampara laborbrigado. Unu funkciulo partoprenis politikajn lecionojn aranĝitajn de Kleriga Instituto kaj ĈSEK la 25. 6. 1961 en Frýdlant n. O.

MARTIN

V Martině čile pracuje kroužek esperantistů při Osvětové besedě. Svě členy vychovává i politicky. V klubovních schůzích jsou probírány všechny současné události: O XXII. sjezdu KSSS, o boji za mír, který vede SSSR, o prvních kosmonautech atd. Zásílají nám přesně podrobné zprávy o své činnosti. Doporučujeme, aby E-kroužky navázaly písemný styk s tímto agilním kroužkem.

En Martin vigle laboras "Rondeto de Esperantistoj" ĉe Domo de Kulturo. ĝi edukas siajn membrojn ankaŭ politike. En klubaj kunvenoj oni pritraktas la lastajn novaĵojn kaj politikajn aktualizaĵojn: pri 22-a konferenco de KPSU, pri

porpaca batalo, kiun gvidas USSR, pri la unuaj kosmonaŭtoj. Al E-rondetoj ni rekomendas skriban kontakton kun tiu ĉi agema rondeto.

ODRY

Na výroční schůzi E-kroužku při ZK Optimit Odry byl zvolen nový výbor. Soudruh Poboček byl zvolen předsedou. Kroužek je velmi činný.

En jarkunveno de E-rondeto ĉe ZK Optimit en Odry oni elektis novan komitaton. S-ano Poboček estis elektita prezidanto. La rondeto estas tre agema.

OLOMOUC

Esperantský kroužek při Kulturním a společenském středisku v Olomouci oslavil 50. výročí svého založení. V sobotu 6. 1. 1962 byl uspořádán přátelský večer s kulturním programem, ve kterém účinkovali: prof. Karel Holub, koncertní mistr symfonického orchestru Čs. rozhlasu v Praze a mužský pěvecký sbor „Haná“, dirigent Vojtěch Novotný. V neděli byl slavnostní aktiv esperantských kroužků.

V sezóně 1962-63 bude uspořádána v Olomouci celostátní výstava cestovního ruchu. E-kroužek Kulturního a společenského střediska města Olomouce hodlá připravit exponát, zobrazující, kam všude do světa se dostaly informační publikace vydané v esperantu v posledních letech v Olomouci. Za účelem získání potřebné dokumentace vyzývá proto všechny členy i ostatní esperantisty, kteří tyto publikace zaslali do zahraničí, aby sdělili potřebné údaje na adresu: Sekretariát Výstavy cestovního ruchu, Olomouc, ul. 28. října 2 (Turista).

E-rondeto ĉe Kultura kaj societa centro en Olomouc festis 50-jaran jubileon de sia ekzisto. Sabate la 6an de jan. 1962 estis aranĝita amika kunveno kun kultura programo. Ludis prof. Karel Holub, koncertmajstro de sinfonia orkestro de Ĉs. radio en Praha kaj kantis vira kanthoro „Haná“ sub dirigento Vojtěch Novotný. Dimanĉe okazis solena laborkunveno de E-rondetoj en Olomouc.

En sezono 1962-63 oni aranĝos en Olomouc tutŝtatan ekspozicion pri vojaĝtrafiko. E-rondeto ĉe KG en Olomouc volas prepari montraĵon, kie oni vidas, ĝis kie en la mondo venis informaj publikaĵoj en Esperanto, eldonitaj lastatempe en Olomouc. Por akiri necesajn dokumentojn, ni petas ĉiujn membrojn kaj ceterajn esperantistojn, kiuj la nomitajn publikaĵojn sendis eksterlanden, sciigi al ni necesajn datojn. Adreso: Sekretariát Výstavy cestovního ruchu, Olomouc, Ul. 28. října (Turista).

PLZEŇ

Esper. kroužek při ZK ROH ZVIL v Plzni navázal spojení s Ĉs. rozhlasem, krajové vysílání v Plzni. Ĉs. rozhlas projevil zájem o ukázkou literatury, která není u nás příliš známá, zvláště ze zemí afrických. Členové kroužku rozeslali na padesát dopisů do nejvzdálenějších koutů světa, a již přicházejí první ohlasy a příspěvky.

Plzeňští esperantisté hodlají takto získané a vysílané povídky přeložit a případně vydat jako knížku alespoň cyklostylem. Proto se obracejí na esperantisty v celé ČSSR se žádostí, aby jim v této akci pomohli a požádali své dopisovatele v takovýchto zemích o spolupráci. Povídky nebo úryvky románů však musí být přeloženy do esperanta; do češtiny není třeba je překládat. Spolupracovníci z ČSSR obdrží výtisk knihy po jejím vyjití zdarma.

Esperanto-rondeto de Uzina Klubo de ZVIL en Plzeň starigis kontakton kun Ĉeĥoslovaka Radio, regiona disaŭdigo en Plzeň. Ĉeĥoslovaka Radio ekinteresiĝis pri specimenoj de literaturoj ĉe ni ne tro konataj, ekz. el Afriko. Membroj de la rondeto dissendis ĉ. 50 leterojn al plej malproksimaj anguloj de la mondo, kaj jam alvenadas la unuaj eĥoj kaj kontribuajtoj.

La esperantistoj el Plzeň intencas la rakontaĵojn tiamaniere akiritajn kaj elsenditajn traduki kaj eventuale eldoni kiel libron, almenaŭ multobligitan. Tial ili petas ĉiujn esperantistojn en ĈSSR helpi en tiu ĉi afero kaj demandi siajn korespondantojn en tiaspecaj landoj, ĉu ili ne volus kunlabori. La rakontoj aŭ fragmentoj de romanoj devas esti tradukitaj en esperanton; en la ĉeĥan oni ne bezonas traduki. La kunlaborantoj el ĈSSR ricevos unu ekzempleron de la libro senpage post ties eldono.

PODĚRBADY

Ĉlenové kroužku dali do sběru 266 kg papíru. S. Fiala založil E-kroužek mezi zaměstnanci nádraží v Nymburce.

La membroj de la rondeto disponigis por paperkolekto 266 kg da papero. S-ano Fiala fondis E-rondeton el gelaborantoj de la fervojstacidomo en Nymburk.

PŘÍBOR

EK při základní devítileté škole zahájil v listopadu kurs pro začátečníky. Udržuje propagační skříňku E-odboru ZK Tatra. Kroužek podá návrh městskému výboru na pojmenování jedné ulice jménem s. Th. Čejky, autora první české učebnice esperanta, který v Příboře studoval.

EK ĉe ZDŠ komencis en novembro kurson por komencantoj. ĝi zorgas pri propaganda kesteto de E-fako ĉe ZK Tatra. La rondeto proponos al Urba nacia komitato doni al unu el la stratoj nomon de la aŭtoro de l' unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto, Th. Ĉejka, kiu studis en Příbor.

TŘINEC

Kroužek esperantistů při ZK-ROH-VŘSR-T. vydal k jubileu KSČ pohlednice. Ačkoli velmi oceňujeme iniciativu a činnost E-kroužku v Třinci, musíme učinit několik poznámek. Ilustrace pohlednic není vhodná pro dobrou propagaci esperanta. Esperanto je jazyk, nikoliv sekta. Příliš se to hemží „E-hvězdami“ a „zeměkoulemi“. Bylo by jistě vhodnější použít jenom esp. textu na rubu Pohlednice, tak jako se tisknou v jiných jazycích. Nezapomeňte, že podle Zamenhova je esperanto druhým jazykem. Často příliš nadšená propagace působí pravý opak.

E-rondeto en Třinec, eldonis al jubileo de KSĈ poŝt-kartojn. Kvankam ni alte taksas la agemon kaj iniciaton de tiea E-rondeto, tamen ni devas fari kelkajn rimarkojn. La ilustraĵoj sur la poŝtkartoj ne taŭgas por bona propagando de Esperanto. ĝi estas lingvo kaj ne sekto. La „E-steloj“ kaj „tergloboj“ abundas. Laŭ nia opinio, pli taŭga estus nur teksto en Esperanto sur dorsa flanko de la poŝtkarto, kiel oni tion faras en aliaj lingvoj. Ne forgesu, ke Esperanto laŭ Zamenhof estas la dua lingvo. Ofte tre entuziasma propagando faras malpropagandon.

DU POLAJ BROŜUROJ:

„Polaj okcidentaj kaj Nordaj Teritorioj:" — „Nia belega Ŝĉecin."

Poŝtformataj, riĉe ilustritaj broŝuroj, 48—resp. 32—paĝaj. En la unua surkovrile troviĝas la landkarto de Pollando, en la dua ĝia situacia mapo en Eŭropo. La unua temas ĝenerale pri la teritorioj ĉe Odra, Nisa kaj ĉe Balta Maro, kiujn — surbaze de la kontraktoj en Jalta kaj Potsdam — Pollando reakiris de la germana ŝtato. Follando ilin vere reakiris, ĉar ili — malgraŭ la jarcentojn daŭranta „Drang nach Osten", malgraŭ la intenca kruela germanigo — ne ĉesis resti polaj, kiel pruvas la enkonduka historia trarigardo kaj la sekvanta detala elkalkulo de la historiaj eventoj, mencianta ankaŭ la teruran Hitleran okupacion. Krome la broŝuro pritraktas la malfavoran rezulton de la Versajla Traktato post la unua mondmilito, kaj la favorajn de la interkonsentoj de la Aliancoj post la dua mondmilito, laŭ kiuj estis decidite fiksi la okcidentan limon de Pollando sur la riveroj Odra kaj Nisa. — Por refuti la okcidentgermanajn asertojn, ke la Poloj ne scipovas bone mastrumi sur la Okcidentaj Teritorioj, la broŝuro detale elkalkulas iliajn ekonomian, industrian, kulturen kaj sciencan progresojn kaj finas per kompara statistiko pri la nombra kresko de la superaj lernejoj kaj pri la evoluo de la industria produktado dum la 14 jaroj de la pola regado. La broŝuron kompletigas eldiroj de gvidaj ŝtatviroj pri la okcidenta limo de Pollando, kaj statistiko pri la senmezuraj homperdoj de la pola nacio dum la mondmilito kaj sekva naziista teroro.

La dua broŝuro pritraktas la arĥeologian, historian, kulturen riĉaĵojn de la granda enkontinenta havenurbo Ŝĉecin ĉe Balta Maro. Dum unu jaro tie alboriĝas pli ol 5000 da komerc-ŝipoj el ŝtatoj de ĉiuj kvin kontinentoj. La koncernaj statistikoj bone skizas la grandiozecon kaj gravecon de la polaj entreprenoj pri marvojaĝado, kaj la senĉese kreskantan nombron kaj tunajon de la komerca ŝiparo kun la transŝarĝigitaj varoj. La havena kunaĵo Ŝĉecin-Svinoujscie kun sia ŝip-konstrua industrio, estis iam unu el la bazoj de la germana militarismo. Hodiaŭ Ŝĉecin, levita el ruino, estas natura haveno ankaŭ por Ĉeĥoslovakio kaj aliaj danubvalaj landoj. Ĝi estas malfemita pordego al la Baltiko kaj simbolo de internacia libera varinterŝanĝo. Sed Ŝĉecin estas ankaŭ bela urbo. Ĝi posedas pli ol 25 placojn kaj parkojn, multege da ĉiuspecaj lernejoj, 6 malsanulejojn, 6 sanigejojn, 15 flegistajn akceptejojn, kaj 25 infanvartejojn. (La nombro de la loĝantaro atingis jam kvaronmilionon.) Ĝi estas unu el la plej grandaj polaj centroj akademias kaj de aliaj kulturinstitucioj. Aperadas ĉi tie du ĵurnaloj, unu semajna gazeto kaj unu monata revuo. — Ankaŭ Esperanto troviĝas lokon en Ŝĉecin. Ekde 1956 aktivas ĉi tie filio de Pola Esperanto-Asocio. Ĝis nun estas esperantigitaj 300 personoj en 14 kursoj. La kunvenoj, renkontiĝoj, konversacioj okazadas en la belega Esperanto-klubejo. Ĝis nun estis disvenditaj 4000 ekz. da diversaj Esperanto-lernolibroj, krom amaso da periodaĵoj. Por honori la jubilean Zamenhof-jaron estis decidite doni al unu el la plej belaj placoj la nomon de L. L. Zamenhof.

En la broŝuroj troviĝas kelkaj pres-eraroj (ekz. tola detruo anstataŭ totala): la uzado de la difina arktikolo estas necerta: ofte ĝi mankas, sed kontraŭe oni skribas „La prezidento Roosevelt". Tio tamen ne malaltigas la valoron kaj efikecon de la du legindaj broŝuroj. D-ro LUDOVIKO IZAK

Změny a nové kroužky

Hradec Králové (dř. MěstOB) — **nyňí:** Park kultury a oddechu, Klub esperantistů, Tř. ĉs. armády 300, Hradec Králové I. P.: Zdeněk Hršel, nám. 28. října (Na Špici) 103/63, Hradec Králové II. J.: Miroslav Hromas, Myslivečková 479, Hradec Králové III. Sch.: PKO

(Adalbertinum), Tř. Čs. armády 300, středa 19.30 — 22.00 hod.

.***

Brno EK při PKO (změna klubovní místnosti) — nyní: Stará radnice, Radniční 8, II. dvůr, 1, poschodí, klubovna č. 9. Sch.: úterý v 19.00 hod,

.***

113. GOTTWALDOV, MDO — esperantský kroužek, Potoky 25, Gottwaldov I- P.: Karel Chudoba, Jiráskova 28, Gottwaldov II. J.: Květoslava Vacková, Kúty IV, 1988, Gottwaldov I. Sch.: MDO — každé druhé pondělí v měsíci od 19.30 hod.

.. .

114. JIHLAVA ZK ROH OONZ — psychiatrická léčebna, esperantský kroužek, Jihlava, Dlouhá stezka 1. P.: Frant. Hlávka, ošetřovatel, Jihlava, Dlouhá stezka 1. J.: Božena Chalupová, zdrav, sestra, Jihlava, Dlouhá stezka 1. Sch.: Kulturní dům léčebny každou druhou středu od 17.00 -- 19.00 hod.

Je důstojné žebrot?

Bohužel se tu a tam vyskytnou „esperantisté“, kteří používají několika frází, jimž se z esperanta naučili, k vymáhání různých darů od zahraničních korespondentů. Nezřídka jde o zboží, kterého je dostatek v našich obchodech. Tak si počínal s. G z Lysé n. Labem v dopise s. A. Lagerovi z NDR. Německý soudruh nám napsal o tomto nedůstojném počínání a my tuto poznámku uveřejňujeme, abychom esperantisty varovali před podobným zneužíváním mezinárodního jazyka.

BUDAPEŠŤ. Maďarský esp. svaz, který byl před rokem ustaven, vydává obrázkovou revui „Hungara vivo“. Redakce Budapešť V. Petöfi Sándor utca 17. Možno objednat u novinářství Orbis, n. p. Stalinova 46, Praha 2.

TOKIO. „Amikoj de Nova Azio“ (Přátelé Nové Asie) je název nedávno založené organizace v Japonsku, která má za cíl kulturní výměnu a dorozumění mezi asijskými národy pomocí esperanta. Vydává esperantský časopis s názvem organizace.

KODANĚ. 47. světový esperantský kongres bude od 4. do 11. srpna t. r. v Kodani v Dánsku. Při něm bude 7. mezinárodní dětský kongres a 32. mezinárodní kongres slepců—esperantistů. Mimo bohatý pracovní a kulturní program budou pořádány ex-kurse po Dánsku (mj. do muzea H. C. Andersena v Odense).

Nakladatelství KoKo v Kodani vydalo knihu esp. satir „La verda raketo“, kterou napsal známý polský esperantský spisovatel Jean Forge.

ŘÍM. 9. listopadu 1961 byl v Římě otevřen „Esperantský dům“. Je přístupný denně od 18-22 hod. Je v něm čítárna a bibliotéka.

ROTTERDAM. UEA vydala universální informační leták o esperantu v šesti jazycích: anglickém, ruském, francouzském, německém, španělském a japonském. Ze socialistických zemí jako spolupracovníci podepsáni V. V. Kulikov, děkan pedagogického institutu v Omsku, SSSR, dr. K. Kordylewski, docent Jagellonské university v Krakově, Polsko, C. Murgin, lektor ekonomického institutu, Sofie, Bulharsko.

SYDNEY. V Austrálii byl natočen 16mm barevný film o Austrálii s mluveným esperantským komentářem. Film zhlédlo již 20 000 diváků.

Promítání trvá 25 minut.

MONTEVIDEO. Školní zájmový kroužek „Grajnoj en vento“ v Montevideu, Uruguay, vydá 1. března 1962 svůj první kolektivně napsaný sešit časopisu stejného jména. Třídy žáků 8-16letých, přihlaste se a pošlete nám texty a kresby. (Mezinárodní formát A4 21x29,7 cm). Adresa: S-ro. Alberto Barrocas, Yaguari 2248 Ap. 3. Montevideo, Urug.

SOFIA. Státní podnik „Distribuce filmů“ v Bulharsku, vydal již 7. rozmnožený sešit v esperantu „O bulharském filmu“. Obsahuje zajímavé články o vynikajících filmových hercích v Bulharsku, o filmech, filmové technice atd.

ZPRÁVY ČESKOSLOVENSKÉHO ESPERANTSKÉHO VÝBORU — INFORMOJ DE LA ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTO-KOMITATO. Vydává — Eldonas: Osvětový ústav v Praze, Blanická 4, Praha 2. Řídí redakční kruh — Redaktas la redakta komitato: Dr L. Izák, M. Lukáš, A. Slanina, V. Tyráček. Vedoucí redaktor — Ĉefredaktoro: J. M. Havlík. Tiskla — Presis: Grafia 31 — Jihlava. Q 17*21614